

kontakto



revuo
de
tutmon-
da
espera-
ntista
junula-
ra
organi-
zo

deman-
do
por
graz :
kien
iras
la
lerne-
jo ?



| N-ro 2, Volumo 7/1970

Fotoj : Ger Paulissen

Nova redakcio

LA CELO DE LA SANGO

Ne tute nova koncepto, sed deziro krei realajn kondiĉojn por efektiviĝi la jam pridiskutitan aspekton de KONTAKTO - tio da redaktoroj estas realo bazo por kredi, ke la kutimaj problemoj de la revuo estos pli facile solvataj, interalie - por esperi, ke KONTAKTO aperados pli akurate.

Kontakto revuo de TEJO

Redaktoroj

Roman Dobrzynski
Ulrich Lins
Simo Milojevic
Hans Zeilinger

Adreso de la redakcio : Hans Zeilinger,
Gobelslehenstr. 1, D-87 Würzburg,
FR Germanio.

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp. : KONTAKTO, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176 Rotterdam-2, Nederlando.

Banko : Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1. Poŝtĉekkonto : 378964.

Presisto : Drukkerij De Kennemer, Wijkeraatweg 178, Velsen-Noord, post Beverwijk, Nederlando.

MANUSKRIPTOJN POR KONTAKTO

oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto, ĉiuj supersignoj de-

vas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj vermane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra marĝeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Li havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem. kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO kaj de la redakcio.

Abonprezo : 8 ned.gld. jare (por gejunuloj ĝis inkl. 25 j. 5 ned. gld.) - Kun la revuo „Esperanto“ kaj la Jarlibro de UFA : 22,50 ned. gld. (gejunuloj ĝis inkl. 21 j.) resp. 30 ned. gld. (ĝis inkl. 25 j.) - Kun la bulteno „Novaĵoj“ de TEJO : minimume 16 ned. gld. (Patronaj Membroj).

Individua numero : 2,20 ned. gld.

Rekramtarifo : 200 ned. gld. por tuta paĝo. Rabato por esperantistaj entreprenoj.

ESTRARO DE TEJO

Humphrey Tonkin, prezidanto,
2131 Tryon Street, Philadelphia,
Pa. 19146, Usono.

Hans Michael Maitzen, unua vicprezidanto, Laerheidestr. 28, D-463 Bochum, FR Germanio.

Hans Bakker, vicprezidanto, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z., Nederlando.

Andrzej Grzebowski, vicprezidanto,
M. Curie-Skłodowskiej 10/3, Bydgoszcz 9, Pollando.

Senad Ćolic, ĝenerala sekretario, Halilbaŝića 23, Sarajevo, Jugoslavio.

Ulla Luin, kasistino, Mygdalsvägen 123, S-13500 Tyresö, Svedio.

Renato Corsetti, vicsekretario, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio.

Ingrid Carlsson, Linderbergsgatan 4, S-85247 Sundsvall, Svedio.

Marian Dobrzyński, L. Staffa 8/18, Warszawa, Pollando.

Uwe Joachim Moritz, Andreasstr. 57, D-5161 Merken, FR Germanio.

LANDAJ SEKCIOJ

Argentino : C. C. 64, San Martin de los Andes, Neuquen.

Aŭstralio : I. Heldzingen, Lot 7 Marville Court, Boronia 3155 Vic.

Aŭstrio : H. Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz.

Belgio : P. Peeraerts, Drakenhoflaan 97, Deurne-Antwerpen.

Brazilo : Caixa Postal 18-ZC 00, Rio de Janeiro.

Britio : M. Reed, MAP, University of East Anglia, Norwich NOR 88C.

Bulgario : p.k. 66, Sofia.

Francio : JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X

Germanio : Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2.

Grekio : Agiu Meletiu 54, (814) Athinaí.

Hispanio : S. Aragay, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14.

Hungario : Kenyérmezou. 6, Budapest VIII.

Italio : Via Po 7, I-10124 Torino.

Japanio : Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokyo.

Jugoslavio : Amruŝeva 5/1, Zagreb.

Koreo : Internacia P.O. Kesto 1232, Seoul.

Madagaskaro : B.P. 1399, Tananarive.


Meksikio : Lauro Aguirre 243-3, México 17, D.F.

Nederlando : G. Peet, Van Linshotenlaan 306, Hilversum.

Novzelando : P.O. Box 40-181, Upper Hutt.

Pollando : Jasna 6, Warszawa 1.

Svedio : T. Janssen, Bjässevågen 1 B, S-71200 Hällefors.





Eduko al malobeo - la tasko de demokrata lernejo

La publiko estis ŝokita: Anstataŭ sin klini antaŭ instruistoj kaj gepatroj kaj per decaj vortoj danki pro la scio akirita en la lernejo la germana abiturientino Karin Storh pledis, ke demokrata lernejo devas ekzerci malobeon. Tio okazis dum la fina solenaĵo en la gimnazio - post sukcesa ekzameno de la abiturientoj. Ŝia kuraĝa parolado baldaŭ furoris ankaŭ tra la gazetaro, kaj intertempe Karin mem fariĝis ĵurnalistino por laŭpove akceli la demokratigon de la lernejo. En la Jaro de la Edukado KONTAKTO aperigas eltiraĵojn el ŝia parolado - kiel kontribuon al la diskutoj en la TEJO-Kongreso en Graz pri „Lernejo - ejo de la revolucio?”.

Fariĝis mia tasko hodiaŭ esprimi la dankon de la abiturientoj. Tiu danko estas bona kutimo, kiun mi volonte sekvas. Ne nur, ĉar mi opinias, ke estas bone sekvi la tradicion, sed ĉar mi tutsimple tre ĝojas pro la abiturienta ekzameno kaj dankas al tiuj, kiuj helpis al mi akiri ĝin. Sed mia danko estos malpli ordinara ol ĉe aliaj finaj solenaĵoj. Kaj tial mi esperas pri komprenemo por tio, kion mi nun provos fari: pensi kritike, respondece parolante pri la temo „Edukado al malobeo kiel tasko de demokrata lernejo”.

Unu el la ĉefaj preterlasoj de la intermilita periodo estis, ke ĝi edukis tro malmultajn demokratojn rezistokapablajn dum krizoj. Estis tro malmulte da demokratoj, kiuj pretis ja esti kritikemaj kaj neobeemaj, sed konsideri la ŝtaton sia ŝtato. Kie la germanoj tiutempe kritikis, ili ektuŝis la radikon de la ŝtato, disbatante ĝin, anstataŭ ĝin plibonigi.

Eduki al kritiko

Tiun ĉefan eraron necesas nun eviti. Nome per niaj politikaj pedagogoj - per tio, ke ili edukas rezistokapablajn demokratojn, ĉar ili ekzercas la malobeon. Tian malobeon, kiu restas demokrata. Trankvilo estis la unua devo de la subulo, maltrankvilo karakterizas la demokraton - konstanta maltrankvilo kaj moviĝo, ne tumulto kaj ribelo. Konsciigi pri demokratio signifas eduki junajn homojn, por ke ili estu kritikemaj, skeptikaj, senemociaj kaj malobeemaj. La lernejo eduku ilin al la vero, al kritiko, sincero kaj malobeo.

Malobeo estas la ĝermo de rezistado. Ĝin necesas ekzerci en demokratio, por ke en reala okazo, do laŭeble antaŭ diktaturo, povu rezisti ĉiuj civitanoj. La rezistado en escepta okazo nur

povas funkcii, se oni praktikis malobeon en la ĉiutaga vivo.

Ĉu tiu malobeo estas instruata en la lernejo? Kion la lernejo konsideras sia tasko? Ĉu ĝi volas eduki junulon al jes-diranto? Al evitanto de disputo je ĉiuj kostoj?

Aŭ ĉu ĝi konsideras sia tasko vekti en la junuloj civitanan konscion? Kion signifas senti sin civitano? Ĉu tio signifas vivi kiel subulo, senkritike pro principo aŭ pro timo de perforto, sekvante ĉiun ordonon de la superularo?

Timiga respondo

Ĉu niaj lernejoj edukas al malobeo, ĉu ili stimulas kritikon, ĉu ili formas liberajn homojn, ĉu ili instigas al difino de la propra pozicio, ĉu ili akcelas memstaran pensadon?

Bedaŭrinde ili tion faras tro malmulte.

Dividi opinion, ĉar la instruisto havas ĝin - tio ne plu regu la pensadon de la lernanto, laŭ la principo: „Mi ne volas malbonigi mian noton.”

La dialogo inter lerneĵanoj: „Mi iros al la direktoro kaj plendos” kaj „Ne faru tion, ĉar alie vi poreterne konflikto kun la instruisto”, ne plu havu lokon en niaj lernejoj. Sed kial ĉiutage okazas tiaj dialogoj? Ĉar sperto prudentigas, ĉar malobeo ofte ne trovis eĥon, nek komprenemon

La politika kaj socia instruado havas altajn celojn, laŭ la oficiala instruprogramo. Sed: scienca esploro montris, ke la rezulto de tiu instruado estas ne kuraĝiga. Je la demando: „Ĉu por vi persone multo ŝanĝiĝos, se ni tie ĉi havus diktaturon?” 50% de la abiturientoj ne donis respondon aŭ respondis per „Ne”.

Tiu nombro estas timiga. Ĝi montras la danĝeron, ke tiel edukitaj gejunuloj tute ne rimarkus iom-post-ioman transiron de demo-

kratio al diktaturo. Ke ili do preferus adaptiĝi al la cirkonstancoj anstataŭ rezisti.

Estas malbone, se instruisto dum duona jaro prezentas nur sian unuflankan starpunkton pri la limo ĉe Odro-Niso. Malbone tamen ankaŭ, se en la paŭzoj la lernantoj insultas pro tio unuflankeco, sed dum la instruado ŝajnigas vigran interesiĝon pro la notoj.

Kelkaj instruistoj, ĉe kiuj ni obeeme lernas la demokratiajn instituciojn, instruas malĝustan harmonion. Ankaŭ en demokratio ekzistas konfliktoj kaj batalo de interesoj. Instruistoj kaj pedagogoj silentas pri la neceso kaj malkompreneblo de konfliktoj kaj admonas pri devoj. Instruistoj kaj lernolibroj prisilentas, ke - por servi al komunajo - oni kelkfoje ankaŭ devas sin starigi kontraŭ ĝi. Disvastigata estas aŭtoritateca sinteno. Celo de tia edukado ŝajnas esti, ke la homo funkcii kiel ĉenero en la tuto, akceptu senkritike la politikon de la superularo kaj estu kvazaŭ sandirektita civitano.

„Ĉion necesas pridubi”

Kiel aspektas la postuloj por la estonteco?

André Gide diris: „Ĉion necesas pridubi.” Dubo nur povas efiki tie, kie foresto de kredemo al aŭtoritatoj malfermas la rigardon.

Mi ne apartenas al iu ideologia ribelo de lernejoj. Mi provis demokrate agi interne de la lernejo. Kaj nun mi venis tien ĉi por alvoki al malobeo, kiu ne estas tumulto kaj ribelo.

La maltrankvilo de lernantoj kaj studentoj montras, ke politike konsciaj gejunuloj rigardas kun kritiko la pli maljunajn kaj ilian agadon, alprenante siajn proprajn poziciojn. Sed la ribelo ankaŭ montras, ke neniu diris al ili kiel esti demokratoj efike malobeemaj. El ilia skeptiko kaj dubemo bedaŭrinde tiam ofte rezultas indiferenteco.


Edukado kaj malobeo do estas tasko de la lernejo.

Nek kaoso nek troa ordo

La lernejo de morgaŭ ne eduku al kaoso, sed ĝi devas asigni al ordo kaj rezisto la saman rangon en la skalo de valoroj. Tro da libereco por la unuopulo limigas la liberecon de la alia aŭ perdiĝas en la superlibereco de la kaoso. Tro da ordo, normigado, reguloj, malpermesoj kaj antaŭskizitaj vojoj por pensado, sentado kaj agado senpere limigas la spacon de libereco.

Ne miru, se mi multe pli forte timas la senperan limigon de la persona libereco per konvencio kaj malpemesoj ktp. ol la ekstreme penseblan endanĝerigon per tro da libereco.

Dek miaj samklasaninoj iĝos instruistinoj. Mi deziras al ili, ke ili evoluu al pedagogoj, kiuj estas sufiĉe suverenaj por instrui malobeon kaj havas la forton por kreeme ekzerci malobeon kun siaj lernantoj.



Ondo de pesimismo en usono

Seniluziĝo, pesimismo. Ambaŭ ŝajnas regi Usonon. La memkonscio, la fido pri la propra misio kaj neeraripovo jam delonge suferetas. Disvastiĝis necerteco. Necerteco sur ĉiuj kampoj. Komenciĝas per tio, ke al vizitanto de Novjorko oni konsilas nepre eviti certajn stratojn de post certaj horoj. Harlem estis por blankulo jam delonge kvazaŭ malpermesita teritorio, kaj nun eĉ per aŭtobuso oni apenaŭ kuraĝas iri tien. Ankaŭ la subteran fervojon en Novjorko oni prefere ne uzu dum vespero, kiel oni diras. Kiel povus helpi unusola konstante kunveturanta policisto? La ondo de perforto - jen la timo - baldaŭ leviĝos super la kapoj de tiuj, kiuj kredas sin senkulpaj pri tio. Jam nun oni preskaŭ ne plu scias kion fari, preskaŭ pretas rezignacii. Kien tio konduku?

Necerteco ankaŭ rigarde al la estonteco. Ne plu ĉio fariĝas ĉiam pli granda kaj pli bona. La plej multaj usonanoj vidas perdiĝi la estontecon en nekontrolebla vortico. Ili havas la senton esti komplete senhelpaj, mem ne plu kapablaj al propra iniciato. La evoluo iros per si mem, laŭ ili.

Cu do ne estas eliro? La plej pesimistaj responde levus la dekstran brakon. Ne estas malmultaj, kiuj kredas, ke Usono iam, ne ĉe la venontaj elektoj, eble ankaŭ ne ĉe la postvenontaj, finiĝos en faŝismo, kaj ankaŭ ne estas la plej stultaj. Ankoraŭ malproksima de Germanio de la jaro 1932 estas Usono. Sed jam nun ĉiam pli obstiniĝantaj konservativaj rondoj klaras „komunistajn elementojn” malantaŭ la kontraŭmilitaj demonstracioj, la kreskanta drogondo, la seksa liberismo. Sed simile senskrupule studentaj ribelantoj, eĉ la Nigraj Panteroj, uzas naci-socialisman terminologion. Policistoj nomiĝas gestapanoj, la lando koncentrejo, la Nacia Gvardio SS.

„Ni havas nenion por perdi” tamen ne estas nur la sinteno de radikalaj nigruloj, sed ankaŭ de radikalaj blankuloj. La bombatenkoj en Novjorko montris tion. La homoj ne plu komprenas siajn infanojn, ne scias, pro kio ili „tion” meritas.

Kaj la infanoj forturnas in de siaj gepatroj: „La maljunuloj ja ne komprenas nin.” Ili forĵetas la virtojn karajn al la usona meztavolo kaj eĉ iom malestimas siajn gepatrojn, kiuj konsideras sian Prezidenton Nixon la ĝusta viro. En multaj familioj oni ĉesas diskuti ĉe certa punkto: „Ja ne havas sencon.”

La usonanoj ŝajnas perdi ian naturan naivecon. Ĝin anstataŭas obstina persisto. Bedaurinde, ĉar ĝuste tio faris la loĝantojn de la Nova Mondo tiel ŝatindaj. Versajne ĝin atingis la vietnama milito kaj ĉio, kio ĝin sekvis. Lastan someron tio ankoraŭ ne ĉie estis klara. Nun oni ne plu povas ĝin preteratenti.

Novjorko ne estas Usono, Novjorko estas pli rapida kaj malpli persona. Tio respeguliĝas en



la vizaĝoj de la homoj. Sed io nova aldoniĝis: malfido kaj rifuzo. Rifuzo kaj ribelemo ankaŭ en la vizaĝoj de nigruloj. Ili solaj ŝajne fariĝis pli memkonsciaj, mem prenas al si la permeson por tio, kion ankoraŭ antaŭ nelonge la blankuloj opiniis devi eksplicite doni al ili. Ekstere la fiera afrika hararo fariĝis dokumento, interne restis la malnova sentemo.

Nigro kaj blanko ignoras unu la alian, la blankuloj ŝajnas tamen iom pli timemaj. Oni apenaŭ rigardas unu la alian, apenaŭ parolas unu kun la alia. Komunaĵoj, tiel oni ĉiam denove aŭdas, ne plu ekzistas. Kion do helpu la rapidiĝita intergrigo de la lernejoj kaj loĝkvartaloj? Multaj, kiuj ĝin ne plu volas, ne estas blankuloj, sed nigruloj.

Paroltemo ĉie estas la rapidanta inflacio, la kreskantaj mastrumaj kostoj, la altiĝantaj impostoj. La propra domo, la kolegio por la infanoj, revoj pri la vivo estas detruitaj. Tio ne estas nur la kulpo de la registaro, laŭ ilia opinio, tio estas la kulpo de - nu jes, de kiu, fakte?

Neniu povas tion precize diri. Restas al ili la malagrabra sento, ke Usono descendas. Ili diras: Ni nur povas esperi, ke tio ne okazos al ni. Ili klopodas ŝajniĝi sin esperoplenaj. Kaj tion klopodante ili tamen estas refoje tre usonaj.

G.V.

Hispanio

Rekviemo por amas-murdisto

Ĉijare pasis dudek-kvin jaroj post la fino de la Dua Mondmilito - de milito, kiu postulis kvindek milionojn da viktimoj kaj kies teroro estis ĝis tiam tute senprecedenta. Krom ĝojo pro la detruo de faŝismo kaj pro la neripetiĝo de tia kataklismo - ĝojo tamen relativa, ĉar ne pasas tago, kiam ne en diversaj partoj de la mondo homoj estas mortigataj, subpremataj kaj ekspluatataj - preskaŭ ĉie do superregas funebro pro la mortintoj kaj espereble iom firmigita volo streĉi la klopodojn por la konstruado kaj konservado de pli paca mondo kaj pli justa socio, malgraŭ pluraj evolutendencoj, kiuj ne permesas troan optimismon, ke tia fina celo estos baldaŭ atingita. Sed aro da nazioj kaj falangistoj alimaniere memorigis pri la eventoj antaŭ kaj dum 1945. Kun eklezia tolero kaj polica permeso ili ĉeestis rekviemon en madrida preĝejo „honore” al - Adolf Hitler. Sub la persona protekto de la ĉefo de la sekreta polico cent-kvindek homoj omaĝis al viro, kiu - laŭ ili - batalis por „defendi la kristan-okcidentan kulturon kontraŭ la bolŝevisma danĝero”. Celebri diservon por amas-murdisto, kiu plenintence kaj celkonscie eksplodigis la militon, kiu kulpas milionoblan suferon kaj detruon, por tion kondamni apenaŭ sufiĉas vortoj de senlima kolero. Ni vere disponas neelĉerpeblan provizon da okazoj, kiam ni povas protesti - kaj devas, se ni ne volas rezigni nian homecon - kontraŭ milito kaj subpremo en la nuntempo, sed kontraŭ tia senhonta apoteozo al krimegoj ni turnas nin kun neformulebla abomeno kaj kun la insista alvoko plej servere denunci la hitleristojn kaj ĉiujn, kiuj permesis aŭ toleris tiun ofendon al nenombrelaj mortigitoj.



Hitler kaj Franco, 1941, en Hendaye (Francio).

Ian Smith subskribas la proklamon.



Rodezio

Homaj rajtoj ne validas


Komence de marto 1970 la reĝimo de Ian Smith proklamis Rodezion respubliko. 225 semajvnojn post la nelegala deklaro pri sendependeco, la blankuloj plenumis ankaŭ laŭjuran disigon de la brita krono.

Valoras ĵeti rigardon sur la konstitucion, kiu nun ekvalidis en Rodezio. Farsan karakteron jam havis la plebiscito, per kiu oni decidis pri la konstitucia propono en junio 1969: El 235000 blankuloj (5% de la loĝantaro) 82000 havis voĉdonan rajton; el la 4,8 milionoj da nigruloj (95% de la loĝantaro) 9000 rajtis voĉdoni. 73% de la donitaj voĉoj aprobis la proponon.

Kerno de la nova konstitucio estas la leĝo pri distribuo de terposedaĵo. Al eŭropano povas meze aparteni sepdek hektaroj, al afrikano kvar. Anoj de unu raso rajtas eniri la posedaĵon de la alia raso nur kun speciala permeso de la ministro pri internaj aferoj. Tiu nova reguligo aparte forte trafas hospitalojn, lernejojn kaj preĝejojn.

La leĝo, kiu celas al absoluta apartigo de la rasoj por ĉiuj vivosferoj, evidente donos al la registaro la necesan rimedon por antaŭenigi la politikon de rasapartismo laŭ la sudafrika modelo. Tiamaniere estu garantiita - laŭ la espero de la reĝimo - la politika kaj ekonomia potenco en la manoj de la blankuloj, kvankam la proporcio de afrikanoj estas dudekoble pli granda ol tiu de la eŭropanoj kaj kvankam ĝi kreskas trioble pli rapide.

La nova konstitucio ne plu entenas deklaron pri homaj rajtoj, eĉ eksplicite neante le eblecon apelacii kontraŭ iu leĝo aŭ instrukcio de la registaro surbaze de la homaj rajtoj.



Laŭ mia opinio

Sekso kaj socialismo

Stefan Maul

Redaktoro de la germana
magazino WELTBILD kaj de
ESPERO KATOLIKA
Eksredaktoro de KONTAKTO

Ne pro la altiteracio mi skribas pri „Sekso kaj Socialismo”, sed ĉar malgranda, eĉ ne mezkvalita itala loka ĵurnalo, kiu hazarde estas presata en Vatikano kaj tial estas atentata pli multe ol ĝi meritas - L'OSSERVATORE ROMANO - antaŭ kelka tempo aperigis en artikol-serio sur la tedaj, kutime ne legataj kaj nur spacon-mangantaj internaj paĝoj ankaŭ kelkajn frazojn pri la interkorespondado de seks-liberaliĝo kaj liberal-socialismo.

Iu nekonata profesoro tie asertis, ke „la progreso de la seks-evolucio koincidas kun la progreso de la social-demokratio”, kaj: „ne estu dirite, ke inter social-demokratio kaj seks-liberaliĝo necese estas interligo, sed ke la social-demokratio ankoraŭ ne travivis tiun idealan revizion, kiu pruviĝas necese por ĝi kaj kiun entrepreni ĝi tamen ne ŝajnas multe inklini”.

Pli miriga ol tiu aserto estis la reago de la publiko post elfosado de ĉi tiu ŝajn-talpaĵo: Oni riproĉis al Vatikano kaj papo prudecon, reakciecon kaj similajn kontraŭseksajn ecojn. Nun neniu povas nei, ke papo kaj Vatikano kaj katolika eklezio ne estas amikoj de pornografio kaj seks-libertinismo. Sed aliflanke apenaŭ estas imageble, ke tiu singarda Paŭlo VI riskus tiel kulpigi la social-demokratojn pro laŭdiraj hedonismo kaj seksismo, kiel oni povus imagi laŭ la skandal-raportoj kaj mok-komentarioj post tiu artikolo. Kaj efektive tuj montriĝis, ke neniu en la Vatikano (ja en la OR-redakcio) legis tiun artikolon, kaj ĉiuj surpriziĝis pri la furiozaj ĝis ofenditaj (kaj ofendaj) komentantoj. Do ĉiukaze ne estas la opinio Vatikana oficiala.

Tamen, kaj jen la tikla punkto, estas fakto nekontestebla, ke sekso kaj socialismo estas

en forta kohero. En la „vere socialistaj” landoj (ekz. Sovetunio kaj GDR) efektive ne estas ia seks-liberalismo, male; sed jam en tia socialista lando kiel Jugoslavio la seks-liberaliĝo sufiĉe progresas. Kaj fine en la okcidentaj, demokrat-socialistaj (aŭ social-demokrat) landoj ĝi multe pli progresis kompare al la nesocialistaj demokrat) okcidentaj landoj. Kial?

Origine la social-demokratia tradicio estas multrilate pli pruda ol tiu de la konservativuloj. Sed la sama spirita sinteno, kiu hodiaŭ en la okcidento balotas „maldekstre”, ankaŭ ŝatas seks-liberaliĝon kiel rimedon kontraŭ la kompleta obsedo per la administrata mondo. En la leĝoj, kiuj katenas la seks-libertinismen, ili vidas (prave) esprimon de tiu politika ordo, kiun ili kontraŭbatalas; sed ne pro seks-libertinismo ili batalas kontraŭ la malnovaj leĝoj, sed pro tio, ke tiuj leĝoj radikas en naturjura ordo - kaj tiel ili kvazaŭ aŭtomate akcelas la seks-liberaliĝon. Pro sia „ideala” celo - liberigi la homon el la devigo per la malnova ordo - do la social-demokratoj fakte akcelas la „seks-ondon”, kaj tial la eldiro de la vatikana gazeto ne meritas primitivan mokon, sed plej altan atenton de la maldekstruloj, se ili zorgas pri la bonfarto de la ŝtato. Kvankam sociologoj asertas ekz. pri Danlando, ke tie la permeso de pornografio efikis bone sur la krim-statistikon, aliaj (ankaŭ social-demokratoj) avertas kontraŭ la pornografio pro malbonaj efikoj sur la ŝtaton kaj la socion.

Social-demokratoj, atentu: en Danlando, ĝuste pro la pornografia ondo, fondiĝis nova kristana partio..... certe ne danĝero, sed signalo por vi!

Kiel plaĉas al la morto

Medicinaj aspektoj de Afriko hodiaŭ

„Onwumbiko - morto, mi petegas vin” nomis nigeriano sian infanon, kiu jam mortis. La dua infano ricevis la nomon „Otoemena - ne okazu duan fojon”; la infano mortis. Kaj la nomo de la lasta estis „Onwuma - kiel plaĉas al la morto”, kaj la infano same mortis.

PROBLEMOJ

Kiam ni rigardas la medicinan situacion en Afriko, tuj okulfrapas la baza diferenco de la problemaro kompare al la eŭropa aŭ usona. Tio



signifas, ke la problemoj de malsanoj tie ne povas esti solvataj per niaj konataj mezuriloj. Ekzemplon donu la statistiko pri ĉefaj mortokaŭzoj en Usono kaj en Nigerio.

Usono

1. Kormalsanoj
2. Kancero
3. Vejnomsanoj de la centra nervosistemo
4. Akcidentoj

Nigerio

1. Pneŭmonioj
2. Infanmalsanoj
3. Malario
4. Stomakaj kaj intestaj inflamoj

Entute do en Afriko superregas infektomalsanoj. Kaj la vakcinoj kutimaj (aŭ almenaŭ eblaj) en Eŭropo forigus ilin post mallonga tempo. Sed la plej multaj ŝtatoj ne povus permesi al si naciajn vakcinokampanjojn - pro monaj kialoj.

La medicina kapacito de unu lando unuavice dependas de la nombro de kuracistoj kaj flegistoj. Tiurilate la situacio en Afriko estas pli ol katastrofa. Dum en Germanio unu kuracisto por 560 loĝantoj povas garantii sufiĉan prizorgon, la meza proporcio inter kuracisto kaj loĝantoj en Afriko estas 1:25000. En Supra Voltao ekzemple ekzistas unu dentkuracisto por ĉiuj 4600000 loĝantoj. Kaj krome Afriko perdas ĉiujare ĉirkaŭ 1200 kuracistojn, kiuj preferas labori en Eŭropo aŭ Usono (kaj tio signifas, ke ĉiujare 30 milionoj perdas kuracistojn!). Ankaŭ mankas sufiĉe da kuraceblecoj. Komparo: Eŭropo disponas pri unu malsanula lito por cent homoj, Nigerio pri unu por 2200, Egiptio pri unu por 1300. Cetere, dek-kvar afrikaj ŝtatoj entute ne posedas iujn medicinajn instruejojn.

SOLVOJ

La realigo de radikalaj ŝanĝoj kompreneble estas en fora estonteco. Momente la plej sukcesplenaj proponoj por solvi la medicinajn problemojn ŝajnas esti:

1. Pli bonigo de lerneja edukado, per tio leviĝo de vivnivelo.
2. Starigo de malgrandaj, anstataŭ grandaj, sanocentroj, gvidataj de flegistaro, eble dufoje semajne de kuracistoj, kie la t.n. preventiva medicino estas praktikata: vakcinoj ktp.
3. Starigo de fabrikoj por produktoj necesaj en civilizita vivo, ekz. por medikamentoj.
4. Instruo de socia medicino al studentoj, konsideranta kaj la sanon de la unuopulo kaj tiun de la tuta popolo.

Plej grandan avantaĝon tamen donus vastskala naskokontrolo, ĉar ĝi estas la plej facile kontrolebla faktoro por ordigi la rilaton inter ekonomia kresko de la loĝantaro. Per tio la vivnivelo povos plej facile altiĝi.

Jen la efikoj de familia planado:

1. Pli bonaj loĝejoj, kiuj malakcelus la ŝancojn de epidemioj.
2. Pli alta popersona enspezo, kio ebligas pli bonan nutradon.
3. Malpli da analfabetoj - la principoj de higieno estas komprenataj de pli da homoj.
4. Pli da mono por luktado kontraŭ malsanoj, ekz. malario.

La problemoj de medicina prizorgo en Afriko do grandparte apartenas al la soci-politika kampo, kaj tial ĝi povos esti sukcese solvita nur per agoj sur tiu ĉi kampo. La bazo por ĉiuj sanopolitikaj agadoj estas naskokontrolo.

Por pli vastaj horizontoj

Se la Esperanto-movado izoligas sin de la mondaj problemoj, kiel „malsato, konflikto, rasismo, diktatorismo, la abismo inter la riĉa kaj malriĉa mondopartoj, la problemoj kiel regi la ĉiam pli kompleksan teknikon”, ĝi restos malforta kaj senefika insulo en la internaciismo. Jen la opinio de David Kelso, ekssekretario de Junularo Esperantista Brita, esprimita en **The British Esperantist**. Argumentante, ke la lingva estas nur unu el pluraj premaj mondaj konfliktopunktoj, Kelso skribis, „kiel regimento en la tuta internaciisma armeo, la Esperanto-movado povas esperi, almenaŭ, ke fine venkos internaciismo kaj kun ĝi, rezulte de ĝi - ne aparte de ĝi, antaŭ ĉi - interlingvismo”. Opinioj, kiel tiuj de Kelso, estas ĉiam pli ofte aŭdataj nuntempe en TEJO, kiu per sia Deklaracio en Tyresö, adoptita pasintan aŭguston, pledis por simila vojo.

Fraŭlinoj aktivigu

„Nur kiam la virinoj estros krom la edzo ankaŭ la plej gravajn postenojn de la politiko, kulturo kaj edukado, tiam ĉio iros glate, sen skuoj, kaj la homaro estos tiel kiel la maro el ĉelo (ne en varma fritilo, kompreneble!)”, skribas legantino en **HEJS-Bulteno**, la oficiala organo de la hispana TEJO-sekcio. En la ĉarma artikolo la legantino, kiu subskribas per Margareta, pritraktas nesufiĉan aktivigon de fraŭlinoj en la hispana Esperanto-movado. Ŝi emfazas emancipiĝon de la moderna virino kaj substrekas neceson pri egaleca partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la homa vivo, ĉar ja finfine „neniu diferenco ekzistas inter inaj kaj viraj kutimoj: ambaŭ fumas, koktelas, sportas, havas longajn harojn, vestas pantalonon, verkas, kritikas, kisas kaj....”

Mesaĝo de kimroj

„La 49a Bonvolmesaĝo de la Junularo de Kimrio al la Junularo de la Mondo, radie disaŭdigita je la Bonvoltago, la 18an de majo 1970.

La junularo de Kimrio alvokas la junularon de la mondo, je Bonvoltago, 1970. Komence de nova jardeko, ni rememoras pasintajn eventojn, aparte la alvenon de la homo sur la lunon. Tiun sukceson ebligis grandega progreso scienca kaj teknologia; kaj ni tutkore esperas, ke nia pli profundiĝinta scio estos uzata por la beno de la tuta homa raso....”

Jen la komencaj paragrafoj de la tradicia Bonvolmesaĝo, ankaŭ ĉijare dissendita al la tutmonda junlaro. Inter la reagintoj al la pasintjara mesaĝo denove troviĝis multaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj



La suno leviĝis malantaŭ la roko de Gibraltaro, la maro, ĵus ankoraŭ griza, flaviĝis, kaj kiam ni turnis la okulojn iom dekstren, ni ekvidis malklarajn konturojn de montoj. Post kvardekhora vojaĝo, kiu komenciĝis en neĝa blovo en meza Eŭropo, la celo estis atingita : Norda Afriko, Maroko. Maghreb el Akxa, la plej ekstera okcidento, estis unu el niaj sopirataj landoj - kie ni intencis malantaŭenlasi la turismon kaj, en ĝia interno, ankaŭ la eŭropan civilizacion, kie ni klopodis vidi, senti enspiri la veran vivon de homoj kaj naturo adaptitaj unu al la alia. Delfenoj aliĝis al nia ŝipo ĉe Algeciras kaj akompanis nin ĝis Tanĝero. Ni forlasis homkovritajn marbordojn,, plenŝtopitajn stratojn, amasturisman kaj la esperon pri „Esperanto parolata”, atendente la aventuron.

Kvarsem montaro

Hans Zeilinger r



Sur strato en la dezerto: dua de maldekstre - la aŭtoro de la raportajo.



La unuaj impresoj pri Maroko tute kontraŭis niajn imagojn. Ni ricevis ilin sude de la ĉefurbo Rabato. Viroj en evoluhelpa stacio, kiuj tie jam dum jaroj ŝutas gutojn sur la varmegan ŝtonon de mizero, ne rakontis pri lunaj noktoj en la dezerto, sed ni aŭdis pri la vero, pri malriĉeco, pri analfabetoj, pri la establita riĉa malplimulto kaj pri la persekutata maldekstra opozicio : ni aŭdis pri reĝo havanta kvardek edzinojn, kiun malmultaj ŝatas, pri lando, kie la vivo por la plej granda parto de la loĝantaro ankoraŭ ne estas homa. Kaj ili rakontis pri sia rezignacio. Tamen, ili konis Marokon, kaj tial ni forlasis ilin kun sufiĉe precizaj imagoj pri kio nin atendos dum nia vojaĝo.

En Rabato, Meknes, Fes, en la tri reĝaj urboj de la nordo, ni nun serĉis la alian mondon. Ni trovis ĝin foje ĉirkaŭita per malnovaj muroj, foje en la malnova urbo, en la Medina. Ĉiu urbo havas sian propran allogon, kaj ni el la tradiciriĉa Eŭropo eltrovis almenaŭ same tradiciriĉan Marokon. Ni vidis la restaĵon de regno, kiu jam komence de la 12a jarcento etendiĝis de la rivero Ebro en la nordo ĝis Senegalio en la sudo. En Rabato staras ruinoj de romiaj konstruaĵoj apud detruitaj reĝaj palacoj. La Medina de Meknes situas interne de triobla, kvardek kilometrojn longa muroĉeno, kaj en Fes ni admire rigardis la plej malnovan universitaton de la mondo. Ĝenerale, Fes plej multe konfuzis, promeno tra ĝi kondukis nin ree en la landon de mil kaj unu noktoj. En ĉiu strateto estas alia koloro, aliaodoro, pro la vendataj varoj. Unu butikoj apud la alia : La preterpasanto ricevas la komercaĵojn en la manon, povas demandi pri ili, dubi, aŭ, se li ŝatas, rakonti la historion de sia vivo, de la vivo de sia familio aŭ la historion de la mondo, sen aĉeti ion. Jen unu flanko : Armetio, vigleco, bruaj moskeoj, do la Oriento. La alia flanko estas infanoj en ĉifonoj, karavanoj de blinduloj, kiuj kantante almozpetas, duonmortaj kripluloj. Ni vidis malsanojn, kiujn Eŭropo preskaŭ nur konas el libroj : manko de proteino, haŭta ekzemo, tuberkulozo, vizaĝoj detruitaj pro sifiliso. Pro tio la romantika fasado de homo kaj naturo en harmonio plene disrompiĝis, precipe kiam poste en la montaro infanoj nenion petas de ni krom panon, ordinaran blankan panon. Sendube : Ekster la getoj destinitaj por turistoj voiaĝo tra lando de la

ajnojn tra kaj dezerto

aportas pri Maroko


Tria Mondo fariĝas politika sperto ; oni ektrovas, ke tia mizero, rigardata en monda skalo, superas ĉiun imagopovon, ke tiaj renkontoj kun la malriĉo elmontras la staton de nejusteco sur nia terglobo.

Dumnokte okazis niaj unuaj spertoj en la dezerto. Ni ĵus estis traveturantaj la montaron Atlaso en la ŝtonaj ebenoj de la dezerto, kiam subite en la lumo de niaj lumjetiloj aperis rivero, en kiu la strato finiĝis. Estis tro malfrue por bremsi, la aŭto minacis fornaĝi, sed tiam restis staranta. Akvo enpenetris tra la pordofendoj. Rapide ni demetis la pantalonojn, eliris tra la fenestroj kaj komune elŝovis la aŭton el la rivero. Ĵus finiĝis la pluvoperiodo, kaj laŭdire en la dezerto homoj pli facile dronas ol soifmortas, ĉar tiaj sekaj riverofluejoj, nomataj wadi, kiuj ofte interrompas stratojn kaj estas preferataj kampadejoj de la beduenoj, dum pluvo plej rapide transformiĝas en torentajn riverojn.

Sude de Atlaso malaperas ĉia vegetacio, oni troviĝas en la ŝtona dezerto (nomata Hammada, kontraŭe al la sabla dezerto Erg). La stratoj estas kvazaŭ ŝnuroj, sur kiuj la oazoj estas la perloj. La oazoj mem konsistas el kelkaj palmoj, du-tri putoj, malmultaj argilokasteloj (Kabbah), kaj la stratoj estas ĝenerale en tre bona stato. Tamen, oni prefere al kutimiĝu al eta ludo : Se du aŭtoj renkontiĝas, unu devas flanken eskapi al la neasfaltita rando: ambaŭ veturas unu kontraŭ la alia per plej granda rapideco - tiel longe, ĝis tiu kun pli malbonaj nervoj flankenveturas.


La koloroj de la dezerto ĉe ambaŭ flankoj ŝanĝiĝas pro la sunalteco de oranĝo al ruĝbruno, de helflavo al grizo ; kelkfoje videblas ankaŭ beduena tendo, nigra punkto sur montodeklivo. Pro tranoktado ni komence havis malfacilaĵojn, ĝis ni eltrovis, ke la sola ebleco por sufiĉe sekura dormo estas tendumi apud la policejoj en pli grandaj oazoj. Nia miro estis granda, kiam grupo da soldatoj, kun ŝtalkingoj kaj maŝinpistoloj, gardis niajn sonĝojn.

En Zagora, vilaĝo en la malproksima sudo, ni spertis la finon de la asfaltita strato kaj la komenciĝon de Saharo. Vojmontrilo indikis „52 tagoj al Tombuktu” (kiu situas ĉe la suda limo de Saharo). Du tagojn ni ankoraŭ povis veturi pli suden sur la transsahara ŝoseo, kaj baldaŭ



Junulo el la dezerto konscias pri la peza

La modo ĉi tie apenaŭ ŝanĝiĝas.



aperis la unuaj sablodunoj. La aŭto fariĝis forno. Ni atingis Mhamid, la lasta loko, kie oni ricevas Coca Cola; kelkaj argilokabanoj, tre multe da sablo, kaj 360 tagojn dum la jaro sunbrilo. Tie ni renkontis du junajn eŭropanojn, li dezertinto de la okcidentgermana armeo, ŝi post fuĝo el orienta Germanio ne plu povis



Delonge li amikas kun la serpentoj.

Akvovendisto en Rabat : Akvo estas oro.




alkutimiĝi al la kapitalista socio. „Kiel fartas la mono?” Ambaŭ ridas. „Ĉu feliĉaj?” La vizaĝoj fariĝas skeptikaj: „La varmego, sablo-ventegoj, soleco de la dezerto. For de tie ĉi, kiel eble plej rapide.” Vespere ni sidis en iu wadi ekster la vilaĝo, kuiris teon, rakontis niajn revojn pri mondo, kiu ne ekzistas, kaj la knabino tordis cigaredojn el haŝiŝo, kaj baldaŭ la rondo eksilentas. La realeco disbloviĝis, la luno enrompiĝis verŝante sian blankan fluaĵon. Palmoj, sablodunoj kaj ni. Ie maltrankvile dormas azeno, homoj foraj de ni ridis, nia oazo de deziroj disvastiĝis, ĝis ĝi kovris la tutan mondon, ĝis la fendo inter realo kaj revo estis mastikita. Kiu tamen intencas realigi en Mhamid siajn planojn pri fuĝo el civilizacio, tiu turniĝu en „Hotel du Sahara” (konsistanta el dormejo kaj unu ĉambro) al Rafi, junulo el la tuarega tribo. Li serĉas fremdulgvadanton, kiu montru al la malmultaj sagacaj turistoj la tendaron de tuaregoj, kiu troviĝas kelkajn kilometrojn for de la vilaĝo, precipe por persvadi ilin aĉeti memoraĵojn ĉiuspecajn. Ili ricevos senkostajn tranokteblecojn kaj manĝaĵojn en la tendaro, senkoston instruon de la araba, kaj foje ili ankaŭ povos akompani karavanon tra Saharo ĝis Malio aŭ Supra Voltao.

Ni restis ĉe la rando de Saharo, ĝis la ĉiama sablo fariĝis fakte ĝena. Ĉar ni ne povis forlasi la dezerton, ni vagadis iomete tra Hammada. Iun vesperon mi vestiĝis per mia Gelabah, la maroka burnuso, prenis plenan akvosakon sur miajn ŝultrojn, kaj dum la luno kolorigis la montojn palflavaj kaj la ebenoj ŝajnis esti malhelruĝaj, mi marŝis tra la dezerto, ĝis mi atingis disfalitan fortikaĵon per atendi tie la sunleviĝon. Kiam la suno finfine aperis, mi spertis neforgeseblan scenon: Subite ĉio aperis en ora koloro, la montoj fariĝis blujaj, kaj dum kelkaj malmultaj minutoj ĉiuj koloroj estis videblaj, ĝis la suno staris alte super la horizonto kaj ĝis la dezerto restis ebena kovrita per brunigraj ŝtonamasoj. Mi ekkuŝis en ombro de muro, sed post iom da tempo fore aperis polvonubo: Miaj amikoj alproksimiĝis por venigi min.

Restus ankoraŭ multe por rakonti: Ekzemple pri aroj da gazeloj, kiuj transpasis nian vojjon. Sed ĉar la tempo urĝis, ni forlasis finfine la dezerton, turnis nin norden kaj baldaŭ estis en Marakeŝ, „la rozo ĵetita trans Atlason”. Ni submergiĝis en bazaroj, marĉandis dum horoj pro kovraĵo aŭ ĉemizo, vidis fabelo-rakontistojn, serpent-dresistojn kaj dancistojn, enspiris la odoron de spicaĵoj kaj azenofekaĵo, manĝis kus-kuson kaj virŝafan viandon. Ni sencele kaj sen difinita intenco vagadis tra la urbo, kiu estas grandega oazo ĉe la rando de la dezerto. Sed ni ankaŭ denove renkontis turistojn, Eŭropo ne plu estis malproksima.

Post nelonge Hispanio troviĝis antaŭ ni en matena nebuleto. Rapide ni razis nin en la aŭto, serĉis la lastajn purajn ĉemizojn kaj tiel kontentige trapasis la kontrolojn. Ĉe du junaj francoj apud ni policisto trovis haŝiŝon, en akompano de soldatoj ili malaperis..... Ni konsciis, ke la civilizacio denove ĉirkaŭbrakas nin.



EKSPORGIO '70

„Progreso kaj harmonio por la homaro” per Ekspo - jen nova versio de la malnova kliŝo, ke la homo estas bona, ke la mondo estas bela. La moto ĉagrenas pro la granda kontrasto inter la alta pretendo kaj la tiel okulfrape pruvita nerealigo. Anstataŭ propagandi homecan arkitekturon aŭ urgkonstruadon en la venonitaj jardekoj, Ekspo demonstracias la ekstravagancajn ideoludojn de avangardemaj arktikektoj.

Ĉu harmonias almenaŭ la ekspoziciita progreso? Rigardante la panoramon de Ekspo, oni neeviteble ricevas la impreson pri pompa malbela: Ĉiuj fareblaj formoj de arkitekturo estas prezentataj de sepdek-sep nacioj (kaj kvar internaciaj organizaĵoj) sen ia koordinado. La okulojn konkuras kapti plej fantaziaj konstruaĵoj, la orelojn ŝtopas elektronika muziko. Kunekzistas bizaraj kaj konvenciaj formoj, futurismaj pavilonoj el plasto kaj aziaj temploj, pop-arto kaj infanaĵoj, arto kaj kermeso.

Ŝajne la japana registaro preferis, ke Ekspone ne makulu memorigo pri Hiroŝima - tiu alia flanko de la medalo, ne preteratentbla, se oni volus efektive prezenti ĉiujn aspektojn de la teknika progreso. Tamen fojfoje la atombomba sufero estas montrata. Kaj en iu pavilono troviĝas ankaŭ la foto de infano, kiu suferas pro venenita akvo, pro

malpura aero kaj pro la bruo de la progreso.


Cetere tamen prezentiĝas mondo, kiu nenion scias pri maljustaĵoj, kaj malsato, milito kaj persekuto. Usono prisilentas Vietnamon, rasapartecon, malriĉon kaj politikan murdon, sed proklamas sub grandega plasta tegmento: „Usonanoj ŝatas sporton.” Apud la admirata lunŝtonaro, konkretaj atestiloj de ekstertera ambicio, videblas indiana arto, kiu spitis la pafemajn prapatrojn de pacemaj spacioniroj.

La ĉeĥoslovakoj deklaras sin „kontraŭuloj de milito kaj de ĉio, kio provokas perforton, malharmonion kaj timon”, dum la rusoj, abunde regalante per modprezentadoj kaj kaviaro, dokumentas en sia pavilono grandan provizon de propraj kvalitoj kaj kvantoj, pri kiuj ja neniu dubas. Ankaŭ ili ĉefimpresas per siaj spacveturaj atingoj.


Denove pri la mondfairo en Osaka

Ekspo multe klopodas por konfirmi la profetaĵojn, ke la 21a estos la japana jarcento. Ĉiuj tridek-naŭ japanaj pavilonoj gloras la miraklojn de la estonteco kaj superŝutas la publikon el centoj da laŭtparoliloj kaj per stereofoniaj instalaĵoj, spegulsistemoj, tridimensiaj ekranoj. Jen la antaŭsignoj de epoko, kiu influas la homojn per totala uzo de sono kaj lumo - por konduki ilin sur la vojon al perfekta mondo, kies teknikan narkotikon la homo ne plu kapablos eskapi.

Kial ĉio ĉi? Tiu kerna demando nek leviĝas nek ricevas klaran respondon. Ekspo, kiu sume kostis 2,3 miliardojn da dolaroj, akcelas adoron de la teknika progreso kiel memcelo. La eksporgio rivelas, kiel homoj estas gvidataj, direktataj, robotigataj, senluziigataj. Sed tamen ĝi ne tute malsukcesas lasi iom da loko por la modesta espero, ke apud la spektaklaj pruvoj de teknika elpensemo troviĝos minimumo da saĝo kaj volo por pliagrabligi la vivon de ĉiuj homoj, kies granda plimulto ĝis hodiaŭ baraktas por transvivi penojn, ĉagrenojn, malsaton kaj katastrofojn.



La pilolo feliĉigas



medicinaj konsideroj. Estas vere paradokse, ke la riproĉoj devenas aŭ de medicinaj laikoj aŭ de kuracistoj, kiuj metas sian propran mondkoncepton super ĝeneralajn homajn problemojn. Unu broŝuro kontraŭpilola, eldonita de germanaj kuracistoj, avertas: La pilolo estas rimedo por plua malsanktigo de nia geedza kaj familia ordo, kaj ĝi verŝajne „transformos Germanion en mortantan popolon”, krome estante „stimulilo por la nuntempa dekadenco”.

Prognozoj pri eventualaj malsanigaj efikoj ne estis pruveblaj, kelkaj ĝenoj - kapdoloro, dikiĝo - aŭ baldaŭ malaperas aŭ estas eviteblaj per ŝanĝo de la speco. Laŭ ĝisnunaj spertoj, trombozoj estas la sola grava danĝero. Inoj kun aparta inklino al vejnomalsanoj do preferere rezignu pri la uzado de la pilolo kaj preferere eĉ entute rezignu pri seksa aktiveco: La trombozorisko dum gravedeco estas multe pli alta ol la risiko ebla per pilolo. Ĉiuokaze, la terapiaj avantaĝoj de la pilolo vaste superas ĉiujn eventualajn danĝerojn.

La situacio komplikiĝas sur la kampo morala. Dum komence la uzado de la pilolo estis komprenata nur por kontroli la infanonombron, ĝi baldaŭ ricevis novajn aspektojn, preskaŭ politikajn, almenaŭ sociajn. La fakto, ke la virino nun mem decidas pri gravedeco aŭ ne, ke la vivo perdis sian seksan hegemonion, havas tre emancipan efikon. Se la asertoj de kelkaj psikologoj ĝustas, nome ke seksa rilato inter viro kaj virino

respegulas ankaŭ la rilaton de ambaŭ en la socio, ni estu tre scivolemaj pri estontaj ŝanĝoj en la socio; sur intima bazo klasodiferencoj ja nuntempe malaperas - per la pilolo.

Kiel ajn estas la sekvoj de la pilolo: Certe ĝi daŭre kontribuas al la feliĉo de sennombraj junaj homoj, ĉar ĝi prizorgas intiman vivon sen timo. Kaj kiam oni rigardas la eblecojn de mondskala naskokontrolo, evidentiĝas, ke verŝajne neniam tiel eta invento liveris tiom da eblecoj por pli bona, por pli feliĉa vivo sur nia terglobo.

Sendube, la intima vivo grandparte ankoraŭ estus tima vivo, se ne komence de la 1950'aj jaroj iu sinjoro Pincus estus farinta malgrandan, sed epokofaran inventon: pilolon, kiu garantias kontrolon kontraŭ nedezirataj rezultoj de la seksa kunvivado. Depost tiam diskutoj pri la pilolaj sekvoj ne plu malaperis, ĉar la „kontraŭbeba” pilolo revoluciigas la eblecojn de la plej intima homa interrilatado. Intertempe la ĝeneralaj diskutoj koncentriĝas al la medicina flanko, kaj ŝajne la lastatempaj atakoj jam efikis: En Usono ekzemple la konsumo de piloloj malaltiĝis dum la lastaj monatoj je 20%. La disputa stilo dekomence estis plej ofte neobjektiva kaj baziĝis - sub la mantelo de medicina respondeco kaj de vivohelpo - sur dubaj moralaj principoj. Kvankam apenaŭ iu alia produkto de la farmacia industrio estis tiel zorgeme esplorita, tamen de tempo al tempo disputoj pri la valoro de la pilolo estiĝas ĝuste pro

Filmo

„Easy Rider”

Du hipioj veturas per bruaj motorcikloj tra la okcidento kaj sudo de Usono, de Los Angeles al New Orleans, trapasante dezertojn, urbetojn kaj vastajn ebenojn. Kelkajn homojn ili renkontas, foje kunveturas aliaj hipioj; en trinkejo ambaŭ ne ricevas priservon, kaj, je la fino de la filmo, ili estas mortpafitaj de ŝarĝaŭtoveturisto.


Peter Fonda, kiu produktis la filmon „Easy Rider” kaj ankaŭ ludas unu el la du ĉefroloj, diris en intervjuo: „La filmo montras, kiel disfalas revvo. La revvo pri vivo surstrata estis fakte nia propra revvo, kaj ni proprokule spertis, ke tiu revvo ne plu estas realigebla. Kvan-kam ni sciis, ke la ekzisto de herooj nuntempe ne eblas, ni tamen provis vivi kiel herooj. Tiun ĉi sopiron vi trovas en la filmo, same kiel la seniluziigon. Multaj vagadas tra la vasta kamparo, ĉar ili aspiras la liberecon de la ebenaĵoj, montaroj, horizontoj. Ĉielo, suno, aero, fruktoj - ni ja revas pri tio. Sed on the road and on the road again, sur la strato kaj denove sur la strato, tie ne plu estas espero.”

„Easy Rider” estas la unua komerca filmo, kiu pritraktas la vivon kaj romantikon de hipioj sen mensogemaj efikoj. Estas filmo tre preciza, tre sincera, kiu respegulas la utopion de

feliĉo mankanta al ni ĉiuj kaj kiu samtempe montras, ke en nia organizita socio ne eblas tia feliĉo. Estas filmo, kiu povas timigi, ĉar ĝi konsciigas pri la alergioj de hardita socio kontraŭ longharuloj, studentoj, hipioj, kaj kiu etendiĝas ĝis la lasta terura konsekvenco: La hipioj estas mortpafitaj.

Aparta kvalito de tiu ĉi filmo, en kiu la alian ĉefrolon ludas Dennis Hopper, estas, ke ĝi scias prezenti sen iu retoriko ambaŭ flankojn: la revon kaj ĝian detruon. Ĝi atingas tion per bildoj nekredible belaj, helaj kaj transparentaj, sed la beleco estas tro brila, tro nervoza. Kaj ĝi atingas tion per muziko, kiu enhavas kelkajn preskaŭ klasikajn erojn el la Folk- kaj Rock-muziko de la lastaj jaroj, de Jimi Hendrix, de The Birds, de Bob Dylan kaj de kelkaj aliaj, do per muziko, kiu donas al la filmo kromajn brilon kaj funebron.

Ne estis antaŭvideble, ke samtempe, kiam la filmo aperis en kinejoj, la mondo estis ŝokita pro la murdorgio de Charles Manson kaj liaj „hipioj” kontraŭ Sharon Tate kaj aliaj loĝantoj de Hollywood. Eble la filmo helpas ekkoni la grandan diferencon inter „hipioj” kaj hipioj, helpas ekkoni, ke ni ne povas ŝovi la respondecon pri krimo de unopuloj al tuta grupo.



Dennis Hopper kaj Peter Fonda.



dana venis

Dana estas iom malgaja. Fakte, ŝi volis iĝi instruistino de muziko: trankvila kariero kun regulaj enspezoj. Sed tui revvo forpasis. Nun ŝi ne plu povas ŝanĝi la direkton. Subite ŝi fariĝis stelulino. Depost kiam la dekokjara irlanda ĉarmulino per sia kanto „All Kinds of Everything” gajnis la Grandan Premion de Eŭropo de 1970, la linio de ŝia kariero krute ascendis. Terminoj, devoj, akceptoj - ŝi apenaŭ plu povas el-saviĝi.

En sian novan rolon ankoraŭ ne tute glitis la kantanta gimnaziano. La stelulinan bruon, kiun depost kelkaj monatoj oni organizas per ŝi, ŝi frontas iom senhelpe, sed ankaŭ kun preskaŭ infana ĝojo. „Mia tuta lernejo ricevis liberan tagon, kiam mi gajnis la Premion. Mi ricevis amason da gratul-telegramoj. Estis beleĝe.”

Dana posedas la tipajn varmajn okulojn de irlandano. Ili estas profundaj kaj brunaj, kaj radias kiam ŝi parolas. Ŝi portas longan nigran hararon kaj disŝprucas ĉarmon, tiel ke ĉiu spontanee deziras interkonsenti rendevuon kun ŝi.

Jam en la delikata aĝo de sep jaroj Rosemary Brown - jen ŝia vera nomo - kantis dum irlanda muzik-festivalo. Ŝiaj unuaj diskoj tekstis „Sixteen” kaj „Little Girl Blue”, kiujn ŝi mem komponis. Sian talenton ŝi ŝajne trovas memkomprenebla: „Mi opinias, ke ne estas malfacile verki kantojn. Kelkfoje mi iom sentas min kiel poetino. Mi havas mil ideojn.”

Elasta koro

- Pardonu ke mi ĝenas vin. Mi estas doktoro Galvez, kardiologo.

Meniam mi aŭdis pri tiu ĉi mezstatura, grizhara sed vigla kuracisto. Des pli surprizis min lia vizito, ĉar mi estis travojaĝanto en la urbeto M. Tie mi troviĝis nur por dutaga ripozo post elĉerpa montgrimpa ekspedicio.

Apenaŭ lokiginte sin en unu el la apogseĝoj de mia hotelĉambro, mia vizitanto ekparolis verve kaj konvinke :

- Ne mirigas min la fakto ke vi min ne konas.

Vi ja estas fremdulo ĉi tie. Ĉar en nia urbo ĉiu infano min konas. Tial eble ankaŭ mia propono povos al vi ŝajni stranga. Temas nome pri tio, ke mi baldaŭ partoprenos internacian kongreson de kardiologoj, kaj por ĝi mi preparas tezon. Ĝian temon mi jam delonge pristudas. Jen mia tezo: mi alvenis al la konkludo, ke ekzistas koroj, kiuj, alveninte al grandaj altaĵoj, pligrandiĝas kaj tiaj ili restas. Dume aliaj koroj pligrandiĝas nur provizore. Descendante al malpli granda altaĵo, ili denove fariĝas normalaj. Tiajn korojn mi nomas „elastaj koroj”.

- Tre interese, - mi diris, klopodante reteni mian oscedemon.

- Jes. Des pli interese, ĉar mi jam delonge serĉas tian koron, sensukcese. Nun mi estas konvinkita, ke via koro estas prototipo de elasta koro.

- Ĉu mia ?

- Kompreneble. Kial vi miras ? Vi ja estas unu el la malmultaj, kiuj sur niaj plej altaj montoj moviĝas kiel en sia hejmo. Tio neniel estas hazardo!

- Ĉu vi kredas, ke . . .

- Ne, mi ne kredas. Mi scias. Mi asertas, ke per via koro mi povos pruvi al la tuta kongreso, fakte al la tuta scienca mondo mian teorion.

- Sed ĉu mi . . .

- Nenion vi devas fari, sinjoro, Sufiĉas ke mi fotu vian koron. Per rentgena aparato, kompreneble. Estus granda via kontribuo al la scienco ! Vi eĉ ne konjektas la signifon de tiu malkovro ! Ĉu vi, do, konsentas ?

- Sed mi . . .

- Dankon, dankon. Vi estas ne nur heroo de la montoj, sed ankaŭ de la scienco.

Dum li tion diris, la okuloj de doktoro Galvez ekbrilis per brilo plena de entuziasma fajro. Kaj evidente ne tre interesite pri tio kion mi povas kontribui al la konversacio, li daŭrigis :

- Mi jam eksciis, ke vi morgaŭ matene intencas forveturi. Tial plej bone estas, ke ni tuj iru al mia laboratorio kaj plenumu la taskon.

Post kvin minutoj ni jam marŝis tra la sunbrilaj stratoj de la urbeto. Pli kaj pli for de la urbo-centro. Survoje ni silentis, okupitaj ĉiu per siaj pensoj. Ĉio estis jam dirita. Kiam, por interrompi la longan, pezan silenton, mi diris „kiel bela prin-

empa tago !”, mia nova konato eble eĉ ne aŭdis min. Tamen al mi ŝajnis legi sur lia vizaĝo averton : „Sinjoro, vi malŝparas vian energion per senutila parolo.”

En periferia strato ni haltis antaŭ teretaĝa domo malnovstila, kun dikaj blankaj muroj. Doktoro Galvez elpoŝigis grandan ŝlosilon kaj malŝlosis la pordegon, kiun li tuj poste reŝlosis de interne. Unuavide la laboratorio de la kardiologo tute ne ŝajnis al mi stranga.

Estas ja nature ke la fenestreto profunde droninta en la dikan muron estu dense kurtenkovrita. Ke deko da provtuboj altaj kaj malaltaj, dikaj kaj sveltaj, enhavu likvaĵojn flavajn, blujajn kaj senkolorajn. El kelkaj el ili konstante, el aliaj nur de tempo al tempo eliĝadis densa vaporo aŭ gaso, akompanata de pli intensa aŭ de pli diskreta susurado.

Meze de la ĉambro staris grandega aparato. Ne, tio ne povas esti rentgena aparato. Mi jam vidis plurajn rentgenajn aparatojn, sed neniu estis tiel granda kaj komplika.

Doktoro Galvez premis butonon. La ŝajne kompakta instrumento kun mil ŝraŭboj, butonoj, skaloj, objektivoj, teniloj kaj aliaj misteraj eroj malfermiĝis kvazaŭ la gigantaj faŭkoj de robota krokodilo.

La dommastro afable indikis al mi kiel mi devis kuŝiĝi en tiun faŭkon, post kiam miaj jako kaj ĉemizo, mi mem ne scias kiel, deiris de mia korpo kaj pendiĝis sur iun hokon.

Antaŭ ol mi povus elparoli „vendredo”, ambaŭ miaj manradikoj estis firmigitaj al la aparato per larĝaj rimenoj. Dum la kuracisto kroĉis miajn maleolojn al la lokoj por tiu celo destinitaj, la unuan fojon li kvazaŭ senkulpigis sin :

- Ne sentu vin ĝenata, sinjoro. Tiu ja estas nur formalajo. Ĉa se vi moviĝus dum la operacio mem . . . mi intencis diri dum la fotado . . . tio povus fuŝi la tuton.

- La tuton ? . . . La tutan kion ? - mi demandis per voĉo iom tremanta, mi ne scias kial.

- Mi pardonpetas, ke iom malrapide iras ĉio, sed mi devas ĉion fari sola. Nome, mi donis liberan tagon al mia kunlaborantino.

Mi ne scias kiel mi ekrigardis lin en tiu momento, sed li tuj aldonis :

- Ho, ne ĝenu vin, vi povas paroli tute laŭte, neniu aŭdas nin. Mia edzino forvojaĝis al alia urbo ĉe siaj parencoj, kaj la muroj estas sufiĉe dikaj por ke la najbaroj ne povu aŭdi nin.

Kuŝante surdorse, nun mi ekhavis tute novan perspektivon de la ejo. De la plafono pendis pluraj neonaj tuboj diverslongaj. Inter ili kelkaj radetoj kunligitaj per ŝnuroj kaj kabloj. Je premo de butono pluraj el ili ekmoviĝis, kaj du malegalaj cilindroformaj pesoj brue ekdescendis. La lumoj estingiĝis. Ĉiuj krom unu palverda, kiu donis fantomecan aspekton al doktoro . . . mi forgesis lian nomon . . . kiam li alproksimiĝis al mi.

Nun li klinis sin super min. Liaj manoj komencis palpi mian bruston. Evidente li volis certigi pri la ĝusta lokiĝo de mia koro. Poste per stetoskopo li aŭskultis ĝin.

Lia vizaĝo estis metale pala. El ĝi elstaris la okuloj verdece brilantaj kiel du smeraldoj. Nur nun mi rimarkis cikatron descendantan de la maldekstra brovo ĝis la mezo de la vango. Lia buŝo malfermiĝis en grimacon de ĝuo de frenezulo.... Kion? Ĉu diris frenezulo? Stranga asociado de ideoj!

- Ha - ha.... ĝuste kiel mi pensis! Via koro certe helpos al mi pruvi mian teorion.... kia bonŝanco ke mi trovis vin....!

- Sed sinjoro....

Mi volis ion diri, ion grandan, ion gravan kaj timigan. Ion, kio terure impresus. Sed el mia seka gorgo eleris nur neartikulita raŭkajo kvazaŭ en sonĝo kiam oni volas krii.

Ankaŭ nenio grava venis al mia menso. Ĉu simple krii? Kial, se neniu povus aŭdi min. Kaj cetere, ĉu mi ne fariĝus ridinda al mi mem? Ĉu entute ekzistas ia kaŭzo por maltrankviliĝo? Mi klopodis trankviligi miajn nervojn.

- Ha, tian koron mi delonge bezonis!

Dum la verdpalaj lipoj super mi eldiris tiujn ĉi vortojn, el inter ili aperis serio de iom disaj, flavaj dentoj de doktoro Drakulo....

Kion mi diris? Ĉu mi diris „Drakulo”? De kie mi prenis tiun nomon? Mi ne scias kial, sed mi ne plu memoris iun ajn alian nomon. Mi streĉis miajn mensajn fortojn por rememori la veran nomon de la kuracisto. Ne, Lugoŝi ĝi certe ne estis.... Mabuse, ne.... Do mi prefere pensu pri io tute alia, kial mi turmentu min. Lia nomo ja ne gravas. Subite intense okupis mian menson bildo desur la kovrilpaĝo de malmultekosta literaturaĉo. Jes, tio estis Drakulo kun siaj verdaj okuloj sub la nigra ĉapelo. Poste venis sceno el iu filmo pri vaksmuzeo... de vivantaj mortintoj... Kiel okazis tio, fakte ĉu estis la aztekoj aŭ la majaoj, kies pastroj elprenadis la koron de vivantaj viktimoj. Ha jes, la pastro mem trinkis ĝian sangon ankoraŭ varman, por tiel rejuniĝi..... Malvarma ŝvito glitis desur mia vizaĝo. Mi estis ŝvitbanita.

En la momento kiam mia torturisto iom malproksimiĝis de mi, per streĉo de mia tuta forto mi provis eligi la manojn de sub la rimenoj. Sensukcese. La provo krevigi la rimenon ne havis pli bonan ŝancon.

La doktoro flankenpaŝis. Kun ekscitita mieno li kaptis iun tenilon kaj movis ĝin. La monstra aparataro super mi komencis moviĝi malsupren, rekte sur min. La faŭkego en kiu mi kuŝis fermiĝadis pli kaj pli. Jen ĝi tuŝis mian bruston kaj peze ekkuŝis sur ĝin.

Momenta halto. Mi retenis la spiron.

Butonpremo. Blanka lumego fulme plenigis la ejon. Jen la fino, mi pensis. Sed nenion mi sentis, krom obtuza kapdoloro.

Iuj radoj ekturmiĝis. La tuta aparataro komencis leviĝadi kaj turniĝi kune kun mi.

Jen mi pendis kapmalsupren. Nova fulmo. Novaj bruoj. Klakoj.... zumoj.... knaroj.... eksplodoj.... susuroj.... grincoj....

Ĉu ĉirkaŭ mi? Aŭ eble en mia kapo?

Ekturmiĝis denove ĉio. La ejo renversiĝis kun ĉiuj tuboj, radoj, ŝnuroj, aparatoj, kaj meze de ili la freneza vizaĝo kun la brilantaj verdaj oku-

loj. Nun klare mi vidis iaspecajn nigrajn flugilojn elkreskintajn malantaŭ li... Fakte ĉio cetere estis konfuza kaj ekster fokuso. La du smeraldoj hipnote rigardis min. Sub ili mi klare vidis nun la kaninojn kreskintajn supermezure....

La faŭkego denove malfermiĝis, kaj tie mi kuŝis senforta, senpova, duonkonscia.


Subite li kliniĝis super min. „Nun venis la fatala momento”, traflugis mian kapon. Tiam en la mano de mia torturisto aperis io brila, io metala. Klakon mi aŭdis. Kun la okuloj fermitaj mi atendis.

Post sekundo, mi malfermis la okulojn. La kuracisto demetis la fajrigilon per kiu li ĵus ekbruligis cigaredon. Tuj poste li malfiksis la rimenojn. Li viŝis la ŝviton de sia frunto:

-Ĉu vi permesas ke mi iomete malfermu la fenestron, estas iom varme ĉi tie.

--- FINO ---

Gandhiece pri gandhi



EDMOND PRIVAT: VIVO DE GANDHI, Eldonis Stafeto, La Laguna, Formato 12x18,5 cm., Paĝo 160 plus 8 bildpaĝoj.

Eble ni entute ne skribus pri libro aperinta antaŭ du-tri jaroj, se ni ne konsiderus, ke estas preskaŭ krimo preteratenti en nia revuo la solan libron pri Gandhi en la Internacia Lingvo, des pli ke ĝi estas verkita de Edmond Privat.

Gandhi abunde ĉeestis en la salutparolado pasintjare en Tyreso, alie - on malofte renkontas tiun nomon en la Movado, ĉu skribe ĉu parole. Tamen, malfacile oni trovas alian personecon en la ekstermovada historio kiu tiomgrade ĉeestus preskaŭ en ĉiu ago de la Movado. La espeantistaro ne devas lerni „satjagrahon” - ĝi praktikas tiun agmanieron ekde sia ekzisto. Sed se tiel estus, la libro de Privat plene superfluus. Se alion ni asertas - ni volas diri, ke apenaŭ troveblas alia biografio en la historio de la homaro, kiu povus tiom abunde nutri la iom ŝrumpiĝintan entuziasmon de la esperantistaro kiel tion faras la „Vivo de Gandhi”. Kiom ajn groteske tio aspektu, ni asertas ke la libro pri Gandhi estas la plej kompleta poresperantista gvidilo kiu iam ajn aperis en la Internacia Lingvo. Ni jamaj aplikantoj de la agadmaniero de Gandhi el la libro de Privat devus finligni tiun batalmetion.

El tuta aro da libroj pri Gandhi, tiun de Privat ni trovas esti la plej bona, ĉar modesta laŭaspekte, simpla stile, celanta ordinaran leganton - pleje gandhieca. Ĝi prve koncentriĝas al la vivofluo de Mahatma, ĉar ĝuste tiu vivo estas la plej impona verko de Gandhi, ĉio kion oni de aŭ pri li nepre konu. Tiu vivo estas lia plena filozofio, ĉiu jaro en ĝi aparta ĉapitro, ĉiu paŝo plena respuguliĝo de liaj vorto kaj penso.

Legante la „Vivo de Gandhi” oni trovas la ĝustan ŝlosilon por malfermi la „misteron de Hindio”. Jam Nehru asertis: „Estas preskaŭ konsternige ĝis kiu grado Gandhi reprezentis Hindion kaj kiel fidele li esprimadis la animon de tiu malnova martiriĝinta lando. Gandhi estis kompleta personiĝo de Hindio kaj eĉ liaj mankoj estis la mankoj de Hindio”.

Fine, tiu ĉi libro ne helpas, ke ni „deĉifru la mistikan personecon de Gandhi”, ĝi helpas, ke ni konsciĝu pri nia propra mistiko, pri nia hipokrita komplikiteco, kiuj estis tiom fremdaj al Gandhi. La konoj pri la vivovojo de Gandhi, helpas al ni retrovi nian propran vojon. Ke tio necesas, atentigis jam Einstein, kiu asertis, ke venis la tempo kiam la homaro devas elkti inter plena memdetruigi kaj la vivo de Gandhi.

homaro devas elekti inter plena memdetruigi kaj la vojo de Gandhi.

Simo Milojevic

REINHARD HAUPENTHAL: Enkonduko en la librosociencon de Esperanto. Bibliografia gvidilo kun komentario. Nürnberg 1968. 44 p.

Oni ne povas trotaksi la apartan gravecon de bibliografioj same kiel de serioze organizitaj bibliotekoj por la konservado kaj plua disvolviĝado kaj ekspuatado de la Esperanto-literaturo. Ke en la lastaj jaroj grupo da junuloj montris tre aktivan intereson por retroiri al la fontoj, al la klasikaj verkoj de nia literaturo, al fundamentaj verkoj hodiaŭ malfacile atingeblaj, tio estas io vere kuraĝiga kaj promesdona por la estonteco. Signo de tiu ĉi serioza kaj scienca sinteno estas la libreto de Hauptenthal. Ĝi sisteme listigas indikojn pri la plej gravaj bibliografioj, enciklopedioj, kompendioj kaj ĉefaj verkoj pri la historio, organizado, faka kaj beletristika literaturo kaj la lingvo de Esperanto, kun klarigaj komentoj. La aperigo de tiu ĉi verko estas gratulinda, ĉar vere ĝi estas enkonduko en la scion pri la ekzistantaj gravaj trezoroj de nia literaturo. La libro tial estas senrezerve rekomendinda al ĉiuj seriozaj esperantistoj.

Paul Neergaard

Krome aperis

La dua eldono de **A research bibliography on Esperanto and international language problems** ĵus aperis. La bibliografio, kompilita de D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de TEJO, celas doni koncizajn informojn pri libroj kaj artikoloj, ĉefe anglalingvaj, kiuj pritraktas la lingvan problemon, interlingvistikon kaj la Esperanto-movadon. Ĝi celas precipe studentojn. La libreto estas havebla, kontraŭ 50 usonaj cendoj, ĉe Esperanto Information Center, 156 Fifth Avenue, New York, N.Y. 10010, USA.

Unuafoje TEJO aperigis informan broŝuron pri si mem. La broŝuro celas popularan manieron por informi pri la multifaceta agado de TEJO, kaj ĝi estas unuavice destinita al tiu Esperanta junularo, kiu troviĝas ekster la organizaj kadroj de TEJO. La 16paĝa infomilo, ilustrita, estas tre modernaspekta. Ĝi estas ricevebla ĉe la kassitino de TEJO, S-ino Ulla Luin, Mygdalsvagen 123, S-13500 Tyreso, Svedio.

MOZAIKO

Fari ĉion fareblan

Kiel rezulton de dumnokta kunsido grupo da junsocialistoj submetis al la ĉi jara Kongreso de Socialdemokrata Partio de Germanio en Saarbrücken la jenan projekton de rezolucio: „La Kongreso insiste postulas, ke oni faru ĉion, kion necesas fari. En la pasinteco oni faris multe tro malmulte. Se ne okazos pli multe, tio povas havi danĝerajn sekvojn. La Kongreso kondamnas plej insiste, ke la partia estraro ne ĉion faris en la pasinteco kion necesis fari.”

„Nova solvo”

Arthur C. Clarke, brita publicisto, aldonis novan variaĵon en la diskutoj kiel solvi la lingvan problemon: En prelego pri mondskalaj televidaj elsendoj, ebligotaj per sistemo de edukaj satelitoj, li sugestis, ke studioj de Walt Disney ellaboru lerneajn programojn, „kiuj ne dependas de la lingvo, sed nur de vidado plus sonaj efektoj.”

Pasteĉo kaj konjako

Parizon ĉagrenis kaj amuzis neordinara atenco: Tridek junuloj kun insigno de Maŭ Zedong enrompiĝis en la luksa frandajejo Fauchon kaj rapidege forprenis kestojn plenajn de nutraĵoj kaj trinkaĵoj - de plej multekosta anserhepata pasteĉo ĝis plej bona konjako. En dimanĉa mateno ili distribuis sian rabaĵon en la mizerkvartaloj de la pariza ĉirkaŭaĵo, ekz. en antaŭa sukerfabriko, kie okcent nordafrikanoj vegetas sub plej primitivaj kondiĉoj. La „maŭistoj” deklaris al ili, ke ĉe Fauchon ili volis montri „la ekspluaton de la malriĉulaj per malmultaj riĉuloj”.

Bomboj en UK ?

Almenaŭ en sia varbkampanjo por individuaj membroj, abonantoj de KONTAKTO kaj Patronaj Membroj TEJO ankoraŭ ne sekvas la Deklaracion de Tyreso. („La mobilizo de la junularo estas subtenenda kaj partoprenenda batalo por la digno de la homo”). Vicprezidanto Bakker atentigis: „La esperantista junularo ĝis nun ne sekvis la ekzemplon de siaj samaĝuloj. Kiam ili ne ricevis sufiĉan rekonon kaj apogon ili ne okupis la Centran Oficejon de UEA, ĵetis bombojn en la Universalkongresan Inaŭguron, nek devigis aviadilon kun kongreskaravano ŝanĝi isan vojon al la tegmenta teraso de la prezidanto de TEJO. Sed ŝajne iom la tempo alproksimiĝas por tiaj iniciatoj. Nur tiam eble la esperantista kolektivo komprenos la neceson de individuigo, de individua membreco de TEJO/UEA aŭ UEA/TEJO laŭelekte”.

Splena Vortaro

Esperanto por komencantoj

- infano = adepto de inoj
- kompensi = politike cerbumi (orientismo)
- kompromiso = decido de Kremlo
- Kalvario = kanto de senharulo
- influo = virina nedisponiteco
- informo = virekscito
- inspiri = kisi
- rafinejo = knabin-internato
- kondominiumo = gumo-fabriko
- intima = eco de samseksulo
- insidi = ripozi laŭ Libro de Amo
- inspektoro = gasto de striptease-budo
- karnavalo = ĉarma pejzaĝo
- inkluziva = rezistema (amatino)
- bojkoto = infano de playboy kaj kokoto
- domo (angle) = hundo-moto
- monolito = Einstein
- folkloro (danismo) = VW
- Miss-elekto = malĝusta voĉdono
- bulteno = momento antaŭ la enbuŝigo de bulo
- inversa = perfortula
- insigno = brustajo
- parcelo = geedziĝa kabineto
- avaro = societo de majunuloj
- oscedi = baldaŭ cedi (en liton)
- titano = jugoslava komunisto
- monopolo = orienteŭropa partifunkciulo

stef

Kontraŭhipia Tajlando

Ĉiu persono, kiu aspektas kiel hipio, ne plu ricevos enirvizon por Tajlando. Laŭ cirkulero de la tajlanda polico, „hipio ne nur portas longajn harojn kaj barbon, sed li estas ankaŭ malpura, iras nudpiede aŭ en sandaloj, ne havas laboron kaj gajnas monon per surstrata pentrado. Li estas ankaŭ necivilizita”. Por la polico de Tajlando hipioj havas „fortimigan aspekton”, kaj iliaj vivkulturoj estas malbona modelo por la tajlanda junularo.


Naciaj preferoj

Kvar junaj viroj diversnaciaj, kiuj edziĝis kun maljunaj virinoj, estas demanditaj, kial ili tion faris. La usonano respondas: „Ĉar ŝi estas riĉa.” La franco: „Ĉar ŝi scipovas ami.” La svedo: „Ĉar ŝi havas belan filinon.” La ruso: „Ĉar ŝi ankoraŭ konis Lenin.”

Letero

„Mi rimarkis la karikaturon pri haremo en KONTAKTO 4/69 kaj volas komenti, ke haremo nuntempe ekzistas nur en iuj partoj de Arabujo, kie la Okcidento povas ankoraŭ protekti la feŭdajn reĝimojn en tiuj partoj. Tiu generalo kun medaloj do estu usona aŭ brita, por ke oni povu vidi la veran bildon.”

H. M. Al-Amily, Bagdad



Personoj kaj organizoj

TEJO iniciatas somerajn lernejojn

La Lerneja Komisiono de TEJO ellaboris kaj ĵus publikigis Programon pri Instruopolitiko de TEJO por la periodo 1970-73. La programo estas dividita en du ĉapitrojn, nome la instruado por la gejunuloj mezlernejaj kaj studentaj, kaj por la junpioniroj. Baza ideo de la instrupolitiko baziĝas sur funkciigo de la t.n. turismaj kursoj kun praktiko, kies ĉefa celo estus paroligi la novlernintojn de Esperanto, devigi ilin al aktiva lingvouzo. La turismaj kursoj signifus efektive kunligon de la ĝis nun aparte traktataj: teoria lernado en kursoj kaj praktika utiligo en turismo. Tio signifas, ke la kurso ne finiĝas per kvarmonata teoria instruado, sed daŭras en iu internacia renkontiĝejo. Tiel estas iniciatata fondigo de la Internaciaj Someraj Lernejoj, fakte somerumejoj kun pure turisma karaktero, kiuj enhavas aktivecojn de nunaj internaciaj renkontiĝoj.

Post la unu- aŭ du-semestra teoria instruado la kursoj partoprenas en iu el la Internaciaj Lernejoj en eksterlando aŭ en propra lando somerumante kun la gekolegoj el diversaj nacioj. Tial estas rekomendinda kunlaboro de najbaraj landaj sekcioj de TEJO kaj fondo de Regionaj Komitatoj, kiuj kunordigos funkciadon de la lernejoj en la koncerna regiono.


Por apogi la tutan iniciaton la Lerneja Komisiono planas lanĉi grandan konkurson inter la landaj sekcioj de TEJO sub la slogano „100 lernejoj, 1000 instruistoj, 10 000 lernantoj”. La konkurso, en kiu la venkinto devus atingi 100 lernejojn, en kiuj Esperanto estas instruata, 1000 diplomitajn Esperanto-instruistojn kaj 10 000 lernantojn, kiuj faris elementan A-ekzamenon, daŭrus tri jarojn, ĝis la fino de 1973.

Revigliĝo en Svislando

Svisa junulara Esperanto-movado removiĝas. Antaŭ nelonge la junulara grupo de Lausanne fondis Iniciatan Komitaton de Svisa Esperanto-Junularo, kies tasko estas prepari reorganiziĝon de la svisa TEJO--sekcio, nome kunvoki ĝeneralan kunvenon, akceptigi novan statuton kaj elektigi la instancojn. Nur kelkajn monatojn pli frue la Komitato de TEJO devis forstrecki Esperanto-Junularon de Svislando el la listo de la landaj sekcioj pro ĝia neaktiveco du pluraj jaroj. La Iniciata Komitato agas sub gvido de Nicole Margot, juna instruistino, kiu post unujara deĵorado, en Egiptio, revenis al Svislando.

Studvojaĝo de Andrzej

Andrzej Grzebowski, vicprezidanto de TEJO, finis viziton al Amsterdam, kie dum tri semajnoj li praktikis en la oficejo de la NEJO-komisiono. Dezirante kompletigi sian scion pri NEJO-agado, li studis la tiurilatan funkciadon kaj interŝanĝis spertojn kun sia kolego Hans Bakker, gvidanto de la oficejo. Grzebowski mem tre aktivis en kelkaj polaj NEJOj, aparte en Pola Skolta Asocio, kie li ĵus ekfunkciis kiel estro de Mezlerneja Skoltaro en la Vojvodia Komandantaro en Bydgoszcz.



Meksika junularo Lanĉis gazeton

Fine de la pasinta jaro Esperanta Meksika Junularo kronis plian stadion de sia evoluo per aperigo de propra gazeto sub la titolo EMJ-Bulteno. La gazeto estas 16 paĝa, moderne ofsetita, kun artikoloj en Esperanto kaj la hispana. Laŭ la enkonduka redaktora artikolo „EMJ-Bulteno” elmontras sian sintenon kaj penson, kiuj pretendas esti unu preta volo por difini - konforme kun la penso kaj sento de la Junularo de la Mondo - la novajn konceptojn, normojn kaj disciplinojn”.

„Muzilo” estas ambicia

Unu el la plej popularaj kanzonaj ensembloj en Pollando hodiaŭ estas „Muzilo”, grupo de avangardaj studentoj el Wrocław. Ne kontentiĝante pri la famo de la muziko kiel „internacia lingvo”, „Muzilo” kantas siajn modernajn kanzonojn en Esperanto, per kiu ili intencas ne nur konigi muzikon tutmondan al sia hejmlando, sed ankaŭ popularigi la polan kanzonarton eksterlande.

„Miĉjo” en cilio

Hans Mihael „Miĉjo”) Maitzen, unua vicprezidanto de TEJO, fine de majo revenis el Cilio, kie li, estante astronomo, denove deĵoris du monatojn ĉe la Eŭropa Suda Observatorio. Sian restadon en Sudameriko Maitzen eluzis por kontakti junajn esperantistojn de Argentino, Brazilo kaj Cilio, same kiel li tion faris pasintjare okaze de sia unua vizito al tiu mondoparto. Tiam, en julio 1969, la vizitoj de Maitzen al Santiago, Buenos Aires kaj Rio de Janeiro, kaj liaj konversacioj kun tieaj aktivuloj, estis escepte sukcesoplenaj. Laŭ lia raporto: „Tian demonstracion de amikeco mi ne ofte vidis en mia antaŭa TEJO-vivo, kaj mia espero estas, ke ĝi ne nur estis impresa kaj agraba por mi, sed same instiga kaj kuraĝiga por niaj geamikoj en Latinameriko, kiuj laboras iusence kiel herooj por Esperanto pro sia geografia kaj lingva izoliteco.”